

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1115 (42/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de la Infanoj	2
- Esperanto alla RAI	3
- Raporto pri la NK es Asizo	3
- Italoj premiitaj en Kroatio!	5
- UECI ha un nuovo direttivo	6
- Convegno a Parma	6
- Natura ed Esperanto	7
- Come scrivere con i caratteri dell'esperanto	8
- Common voice	9
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton	9

MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA TAGO DE INFANOJ



uea Universala Esperanto-Asocio #TagodeInfanoj

MONDA TAGO DE INFANOJ

20 novembro 2021

Konstrui la estontecon nun

La Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Infanoj (UNICEF) estis kreita jam en 1946, do frue en la historio de UN. Ĉi-jare ĝi fariĝas 75-jara. Ĝia vibra kaj trafa intervenado por protekti infanojn tra la mondo memorigas al ni kiom gravas la protektado de rajtoj de infanoj ĉie, kaj gravas la rolo de UN en tiu protektado.

Ĉiu infano rajtas ĝui bazajn servojn kaj profiti okazajn por sia plena disvolviĝo. Protektado kaj zorgo de infanoj estas universala bazo por paco, homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo.

Frue, en 1954, estis deklarita la Monda Infana Tago. Poste, en 1959, la Ĝenerala Asembleo de UN adoptis la Deklaracion pri la Rajtoj de Infanoj, kaj, en 1989, la Konvencion pri la Rajtoj de Infanoj. Tiuj dokumentoj proponas al ĉiuj ŝtatoj gvidliniojn, por ke infanoj estu unua zorgo.

La Raporto de UNICEF de 2021, Statuso de Infanoj Tutmonde -- *En mia menso: Antaŭenigi, protekti kaj prizorgi la mensan sanon de infanoj* -- fokusiĝas pri la mensa sano de infanoj kaj adoleskantoj. En riĉaj kaj malriĉaj landoj, psika malsano, kaj la manko de zorgo, suferigas infanojn kaj junulojn. Ĉirkaŭ 13% de adoleskantoj 10- ĝis 19-jaraĝaj vivas kun diagnozita psika malsano.

Antaŭ la pandemio KOVIM-19, ĉirkaŭ unu el kvin junuloj diris, ke ili jam sentas deprimon. Kaj la pandemio pligrandigis sentojn de necerteco, soleco kaj malĝojo. Pro tio, registaroj devas pli forte financi iniciatojn pri la mensa sano de junuloj.

Per Esperanto, Universala Esperanto-Asocio kaj la esperantista junulara organizo TEJO instigas al amikeco kaj komprenemo inter junuloj de la tuta mondo. Per Esperanto, junuloj povas partopreni en volontulaj agadoj; kunveni por paroli pri siaj vivoj, studoj kaj defioj; agadi en internaciaj organizoj; kaj multe pli. Praktikante unu internacian lingvon sendependan de unuopa nacieco, ili aliĝas al aŭtentike tutmonda movado kie ili povas lerni kaj praktiki principojn de internacieco, tutmondco kaj komuna laboro por krei pli bonan mondon.

Laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, Unuiĝintaj Nacioj proklamis, ke infanoj rajtas al aparta protekto kaj asistado. Infanoj kaj junuloj reprezentas la estontecon, sed ni devas konstrui tiun estontecon nun, per protektado kaj observo de la rajtoj de infanoj.

ESPERANTO ALLA RAI!

Non siete riusciti a vedere la bellissima trasmissione del 15 novembre? Ecco il link!

[https://l.facebook.com/l.php?u=https%3A%2F%2Fwww.rai.tv%2Fdl%2FRaiTV%2Fprogrammi%2Fmedia%2FContentItem-8f7b7837-c796-4a6a-a6e5-35774c1dad78.html%3Ffbclid%3DIwAR3OvkOmVx_OFm_12oCP8MbpuvouVqn_4DKQdbaWVUWo76-BJ9wlbUBgRtI&h=AT1c1sz85NeDMrD8j_i2abjE7LIO3zCivu5BToiK7CsySuNF3TvNlmSgrS8hd2MKARqG-FIT1984T5nzgESIIJDGdwYxYOOs7jDMwa6mWjnMvg99jrF-7QA9onrxXmO13Q&tn=-UK-R&c\[0\]=AT3Jda-P1CzW0VaBi6YMQunhAnOgGiK9c651O4TzbiNCIbX3vkEXM4pcR289OQ76iG5F8Q-P4ZWmDKF8WgZANrtUO5rOUWVWYsnxyWTPPd16caNF_cZRaxDJM5jv8bShyvpCT8RzIURHtDOOdOSo4LEdF00FEBMtosL9I9ESVEWmiyofImfUdb9W45Ji2FEu8xgdIHVCv0cI-bE50f](https://l.facebook.com/l.php?u=https%3A%2F%2Fwww.rai.tv%2Fdl%2FRaiTV%2Fprogrammi%2Fmedia%2FContentItem-8f7b7837-c796-4a6a-a6e5-35774c1dad78.html%3Ffbclid%3DIwAR3OvkOmVx_OFm_12oCP8MbpuvouVqn_4DKQdbaWVUWo76-BJ9wlbUBgRtI&h=AT1c1sz85NeDMrD8j_i2abjE7LIO3zCivu5BToiK7CsySuNF3TvNlmSgrS8hd2MKARqG-FIT1984T5nzgESIIJDGdwYxYOOs7jDMwa6mWjnMvg99jrF-7QA9onrxXmO13Q&tn=-UK-R&c[0]=AT3Jda-P1CzW0VaBi6YMQunhAnOgGiK9c651O4TzbiNCIbX3vkEXM4pcR289OQ76iG5F8Q-P4ZWmDKF8WgZANrtUO5rOUWVWYsnxyWTPPd16caNF_cZRaxDJM5jv8bShyvpCT8RzIURHtDOOdOSo4LEdF00FEBMtosL9I9ESVEWmiyofImfUdb9W45Ji2FEu8xgdIHVCv0cI-bE50f)

RAPORTO PRI LA NK EN ASIZO

Ĉi-jare la Nacia Kongreso okazis en Asizo, grava urbo lokita en Umbrio, regiono kun lokoj kie ŝajnas ke la tempo haltiĝis, pro tio mi donis al ĉi tiu raporteto la titolon "Vojaĝo dum la tempo". Dum la oficiala inaŭguro ĉeestis ankaŭ la

Prezidanto de UEA, Duncan Charters, kaj la urbestro, Stefania Proietti, kiu klarigis kiel Assisi estas urbo inklina al spiriteco, sed ankaŭ riĉa je historio, artaĵoj, belaj pejzaĝoj kaj kosmopolita, do ŝi aprecis ke ĝi estas elektita kiel sidejo de nia kongreso, kie estas invititaj ankaŭ multnombraj eksterlandanoj kaj kiu prezentis programon plena de kulturaj, artaj aktivecoj krom turismaj. Koncerne la eskursojn mi elektis la duontagan ekskurson al Spello kaj la tuttagan ekskurson al Spoleto kaj Bevagna, la aliajn lokojn mi jam pli malpli konis. Mi elkovris ke Spello estas vere juveleto, kun belegaj mezepokaj domoj kaj stratetoj, ĉiuj supreniraj kaj malsupreniraj. La gvidistino priskribis aparte la faman eventon, kiu okazas dum la festo de Kristokorpo, kiam la stratoj estas kovrataj per floroj, tiel ke oni kreas spektaklajn scenejojn multkolorajn; ni povis ankaŭ admiri ekspozicion de pentraĵoj kiuj reprezentas geometriajn figurojn pere de fadenoj, sekve kun multaj koloroj. Je la fino estis gustumado de olivoleo, tipa prilaborado de la areo, ĉe olivmuelilo, kie oni klarigis la mueladon de la olivoj por produkti la oleon. En Spoleto ni vizitis antaŭe la Rokon, sur la pinto de la monteto, sur kiu situas la urbeto, la gvidistino klarigis ke ĉi tiu konstruaĵo iĝis fama malliberejo kaj rakontis al ni iun epizodon je fuĝo. Poste ni malsupreniris kaj vidis la Katedralon, ekstere en romanika stilo kaj interne en baroka stilo, kiu situas en placo fama pro la "Festivalo de la du mondoj", konata en la tuta mondo, dum kiu okazas spektakloj de malsamaj ĝenroj. Ni vidis ankaŭ la antikvan romian teatron kaj la Instituto de mezepoka historio; poste ni iris al Placo de la Merkato, kie troviĝas aparta fontano konstruita kun celo havi la fasadon de preĝejo. Post la tagmanĝo en restoracio, kie ni gustumis la pladojn de la umbria kuirarto, ni iris al Bevagna, malgranda mezepoka vilaĝo, tie ni vizitis la restaĵojn de romia teatro, la mezepokan domon, kie la gvidanto priskribis kelkajn aspektojn de la mezepoka vivo kaj ni spektis la mezepokan meblaron; unu kuriozaĵo: ni elkovris ke la mezepokaj homoj dormis sidantaj, fakte la litoj estis tre mallongaj; finfine ni iris ĉe la ĉefa placo, kie oni vizitis du preĝejojn. Koncerne la kulturan programon mi partoprenis en du seminarioj, unu kun titolo "Komunikado: interpersona, informa, transkultura kaj konfliktsolva", la alia kun titolo "Sankta Francisko kaj la lupoj: paco kaj milito en la nuna mondo", krome mi ĉeestis dum la prezento de novaj libroj fare de Anna Lowenstein kaj Renato Corsetti, fare de Giuliano Turone kaj, post la prezento de pluraj libroj fare de Carlo Minnaja, mi mem prezentis mian novan tradukon "Venecio kaj Eŭropo – Historiaj Studoj", kiu alfrontas, per pliprofundigata historia analizo, la sociajn kaj politikajn aspektojn de Venecio, kompare kun Eŭropo, dum la Moderna Epoko. Mi ankaŭ faris parton de la Komisiono pri la unuagrada ekzameno organizita dum la kongreso kaj partoprenis en la jara Asembleo de IEF. Rilate al vesperaj programoj mi ĉeestis en la unua koncerto de Grazia Barboni, kiu prezentis kantojn de Fabrizio De Andrè kaj famajn kantojn internaciajn en esperanto. Due estis la rakonto-koncerto de Mario Migliucci kaj Chiara Raggi, do ili prezentis rakonton pri esperanto per la aktorado de Mario kaj la kantoj de Chiara, luditaj per gitaro; laŭ mi estis vere interesa eksperimento de nova ĝenro de spektaklo. Finfine mi aŭskultis koncerton de Piero Nissim, la voĉo, kaj Franco Meoli, ludanta la fortepianon, ili prezentis kantojn je spirita karaktero kaj ankaŭ kantojn omaĝe

de la mortinta esperantisto Amerigo Iannacone kaj de la mortinta kantisto Franco Battiato, tiuj ĉi lastaj kantoj vere placis al mi. La vespero post la tuttaga ekskurso estas dediĉita al kvizoj, do oni kreis du teamoj per lotumado, kaj ili devis respondi al demandoj pri esperanta movado kaj kiujn povis vidi ankaŭ la publiko ĉar ili aperis sur granda ekrano. Mi venas je la fino de mia rakonto: mi povas diri ke estis vere bela sperto per kiu mi povis mergiĝi en la magia atmosfero de Umbrio kaj kie mi povis havi rilatojn kun malnovaj geamikoj kaj mi povis paroli ankaŭ kun novaj personoj el la esperanta medio.

Doktorino Paola Tosato

ITALOJ PREMIITAJ EN KROATIO!

Kroata Esperantista Unuiĝo anoncis la rezultojn de la 5-a Tradukkonkurso "Lucija Borĉić", 2021

PROZO 1-A PREMIO:

NICOLINO ROSSI (Italio) por la traduko de la rakonto „La urboj nevideblaj” de Italo Calvino - origina lingvo: itala

PROZO 2-A PREMIO:

- STELA BESENYI-MERGER (Hungario) por la traduko de la rakonto „Babiladoj sur plastaj ĝardenaj seĝoj matene” de László Kollár-Klemencz - origina lingvo: hungara

- VITOR LUIZ RIGOTI DOS ANJOS (Brazilo) por la traduko de la rakonto "La eklezio de la diablo" de Maŝado de Asizo - origina lingvo: portugala

PROZO 3-A PREMIO:

- **MIRELLA DE MARTINI (Italio)** por la traduko de la rakonto „Monto" de Mauro Corona - origina lingvo: itala

- **ANTONIO RICCO (Italio)** por la traduko de la rakonto „Fenestro al la nekonataĵo" de Antonio Tabucci – origina lingvo: itala

POEZIO 1-A PREMIO

NICOLINO ROSSI (Italio) por la traduko de la poezi-bukedo de tri poemoj: "La foiro", „Kio estos” kaj „La kozoĵ ni forgesis” de Nino Pedretti origina lingvo: itala – dialekto romagnolo

POEZIO 2-A PREMIO:

- **MIRELLA DE MARTINI (Italio)** por la traduko de la poemo „Ĉiam venu Sinjor” de David Maria Turolto – origina lingvo: itala

- BRANDON SOWERS (Usono) por la traduko de la poemo „Paĉjo” de Sylvia Plath – origina lingvo: angla

POEZIO 3-A PREMIO:

TATJANA AUDERSKAJA (Ukrainio) por la traduko de la poemo "Kamparaj geknaboj" de N. A. Nekrasov - origina lingvo: rusa

UECI HA UN NUOVO DIRETTIVO

Il nuovo Comitato centrale UECI per il triennio 2021/2024 è così composto:

Tiziana Fossati presidente

Raffaele Del Re vicepresidente

Consiglieri: Norma Cescotti, Giancarlo Del Donno, Chiara Franchitti, Giovanni Gazzola, Carlo Sarandrea, Felice Sorosina.

CONVEGNO A PARMA

Saluton al vi!

Sviluppo Sostenibile e Trasporto Sostenibile L'Associazione Esperanto G. Canuto di Parma e IFEA-IFEF, in collaborazione con UEA - FEL - BEMI, nell'ambito del progetto Erasmus+, organizzano il seguente programma: Sabato 20 novembre: 10.00-18.00: riunioni organizzative del progetto (salone dell'ex-municipio in via San Leonardo, 47) Domenica 21 novembre: 9.00-12.00: Visita alla città - incontro presso l'entrata della stazione FFSS. Pausa per pranzare 15.00-18.00: Manifestazione aperta al pubblico nella Biblioteca del Monastero San Giovanni, piazza San Giovanni, 1. Padre Gustavo Zanolli, presidente del Gruppo esperantista locale, saluta nel nome del Gruppo, introduce l'esperanto e presenta la biblioteca e la sua storia. Rodica Todor, presidentessa dell'IFEF, parla del tema del nostro progetto di partecipazione KA2 Educazione attiva allo sviluppo e al trasporto sostenibile Vito Tornillo dell'IFEF-IFEA tratta il tema "Installazioni del futuro già presenti in ferrovia". Alessandra Madella mostra l'animazione "Le Avventure della Saggia Stellina e del meraviglioso gruppo" alla quale hanno collaborato membri del Gruppo esperantista di Parma, e i video "Il Coniglietto Kungfua" e "La Società Verde"... Ing. Franco Bressanin ci insegna "Come coltivare verdure anche in vagoni ferroviari" Sera: libera oppure altro programma/riunione Lunedì 22 novembre: Mattino 9.00: IFEF-riunione del consiglio direttivo. Contemporaneamente lezione di Esperanto di Luigia Oberrauch Madella (stanza dell'ex-municipio, Via S. Leonardo, 47). Pomeriggio 14.00: Visita gratuita a musei di Parma: Pinacoteca Stuard, Casa della Musica, Castello delle Marionette ... Informazione importante: Secondo le vigenti norme igienico-sanitarie, all'ingresso del monastero è necessario esibire il Certificato

verde o dichiarazione di tampone con esito negativo entro 48 ore. Sono sempre validi l'uso obbligatorio della mascherina e la distanza di 1 metro tra le persone.

La Esperanta Asocio G. Canuto Parma kaj IFEA-IFEF, kunlabore kun UEA – FEL – BEMI, ene de partnera projekto Erasmus+, perado de KOSMO agentejo, organizas renkontiĝon en Parma. Sabato kaj Lundo matene okazos organizajn kunvenojn pri la projekto, dimanĉo estos malfermita al la ekstera publiko, do ni invitas esperantistojn kaj ne esperantistojn el la proksimeco ĉeesti kun ni, laŭ la aldonita programo de la afiŝoj. Eblos ankaŭ rete kunligi per Zoom:

<https://us02web.zoom.us/j/86425241815?pwd=MVdMdTVZVNjRHa0t5UXhNSE5XSFVOQT09>

ID kunveno: 864 2524 1815 Paskodo: 387830

Dankon,

Por la Parma Grupo kaj IFEA

Vito Tornillo

Natura ed Esperanto *due lingue universali*

Natura kaj Esperanto *du universalaj lingvoj*

27 e 28 novembre

Prenotazioni entro mercoledì 24 novembre
al 3495457563 (wapp) / naturalmenteeduaps@gmail.com

Programma

ore 10:30 Accoglienza in Azienda
ore 11:00 Introduzione "La Natura e l'Esperanto"
ore 11:30 - 13:00 laboratori esperienziali
ore 13:00 - 14:00 Pranzo al sacco (a cura di ogni partecipante)
ore 14:00-16:00 laboratori esperienziali

*Nota: tutte le iniziative saranno svolte bilingue (italiano-esperanto)
L'evento si terrà all'aperto nel rigoroso rispetto delle norme anti-Covid.*

Azienda Agricola "Vivincampagnabio"
Loc. I Magnoli, San Castrese di Sessa Aurunca (CE) - Italiaipsum



COME SCRIVERE USANDO I CARATTERI DELL'ESPERANTO, SENZA IMPAZZIRE TROPPO

Da molto tempo, come molti, ho avuto il problema di scrivere in esperanto con il computer: ai bei tempi delle macchine per scrivere, bastava tornare indietro e mettere l'accento circonflesso sulla lettera (sì, compresa la ŭ), e si andava avanti. Convincere i computer è stato molto più arduo, ma ne gli ultimi tempi le cose sono molto migliorate. Uno dei sistemi più semplici, soprattutto per chi, come me scrive con due dita, è quello di usare i simboli delle tastiere estese, e inserirli uno alla volta, il che però rallenta la scrittura. Ho trovato questa tastiera aggiuntiva, che permette di digitare direttamente i caratteri, facendoli semplicemente precedere da un tasto morto, il tasto "\". Per ottenere, ad esempio, "Ĉ", premerò "\", poi "Maiusc" e "C" (questi due assieme, come al solito). L'ho trovato qui:

http://www.parracomumangi.altervista.org/w/index.php?title=Scrivere_l%27esperanto_al_computer#Tastiera_con_tasto_morto_-_Barra_Rovesciata_.28.5C.29

NSiR viene scritto con questo sistema da quasi un anno. La tastiera rimane silente fin quando non la si usa, e basta selezionarla dalle tastiere in basso a destra nella barra:



Funziona anche come tastiera italiana normale, e la si può lasciare selezionata normalmente: diventa esperantista semplicemente quando si usa il tasto "\", che non è molto frequente (neanche tra i programmatori, a quanto ne so).

COMMON VOICE

Alle "macchine" possiamo anche parlare, ma come possiamo essere certi che ci capiscano? E che capiscano l'esperanto, che, per sua natura, ha tantissimi accenti? Questo progetto ha proprio lo scopo di raccogliere campioni di voci in esperanto: collaborate anche voi!

https://www.youtube.com/watch?v=zAKt_yE692o

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON

La piattaforma europea Futureu è un esempio di come non funzionano i sistemi di traduzione automatica, con risultati a volte buffissimi anche con frasi semplicissime: Riconoscimento dell'esperanto come una delle lingue culturali dei cittadini dell'UE

(http://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/145037#comment_143948)

Original text

A Budapesti Orvos-egészségügyi Eszperantó Szakcsoport régóta támogatja a "Meszesedés ellen eszesedés" programot. Örülünk, hogy Molnár László Tanár Úr ezen a fórumon is említette az eszperantó nyelv ilyen célra való alkalmazását. -- La Budapes'ta Medicina Esperanto-Fakgrupo jam delonge subtenas la programon "Kontrau' kalkig'o cerba gimnastiko". Ni g'ojas, ke Sinjoro Profesoro László Molnár menciis ankaŭ kadre de tiu c'i forumo la tiacelan aplikadon de Esperanto. Translated text Il Budapest Medical Health Esperanto Group sostiene da molto tempo il programma "anti-pazzo". Siamo lieti che László Molnár Insegnante abbia menzionato l'uso dell'esperanto per questo scopo in questo forum. — La Budapes'ta Medicina Esperanto-Fakgrupo marmellata Delonge subtenas la programma "Kontraù kalkig'o Cerba gimnastiko". NI g'OJAS, ke sinjoro profesoro László Molnár menciis ankaù kadre de tiu c'i ForumO la tiacelan aplikadon de Esperanto.

Il programma "anti-pazzo"... chissà che cosa si voleva dire in origine? Dall'Esperanto sembrerebbe qualcosa di simile a "Ginnastica contro la calcificazione celebrale" ... voi ne sapete qualcosa di più?